
Dep. legal BI 1007-88

GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

NIA PONTO

Barrencalle Barrena, 7 - 1.º
Telefono 416 44 92
48005 - BILBAO

2ª jaro Aŭgusto 1988 Numero 10 (4)



pri la kongreso * * *



HONORA KONGRESA KOMITATO

Ni komencas la demarŝoj por atingi aprobon de la ĉefaj reprezentantoj de la Vaskaj Institucioj (registaro, urbestraro, deputitaro kaj klerigaj instancoj).

LOKA KONGRESA KOMITATO

Ni preparis ĝin sed tial ke mankas la definitivan aprobon de kelkaj membroj ni plublikigos ĝin en la venonta numero de "Nia Ponto".

KONFIRMILA KARTO

Post kelkaj tagoj ni eksendos la konfirmilaj kartoj al tiuj kiuj jam pagis sian kotizon al la Kongreso.

La somerferioj malhelpis nian pli rapidan sendon.

LOĜEJO

Ni atendas konfirmon pri du universitataj restadejoj tial ke en Bilbao ne ekzistas multenombraj hoteloj, tamen kun la kondiĉoj de la restadejoj ni sendos liston de la hoteloj kun oficialaj prezoj.

Jen ĉi-sube memglueblan propegandan strion kiun ni jus eldonis. Ĝi estas kolore oranĝa fluoreska kaj formata 19,5 x 6,3 centimetroj. La kostoj tute malavare pagis la Bizkaja Ŝparkaso kaj la kvanton estis 5.000 ekz.

Vi vidos ilin de nun algluitaj strate, prefere sur semaforaj kaj lanternaj fostoj en nia urbo.

Se vi volas kelkajn aŭ krome volas kunlabori en ĝia algluedo tre la urbo, petu ilin ĉe ni.

lengua internacional
esperanto
CURSOS
BIZKAIKO KUTXA
TEL: 416 44 92 (de 19 a 21 h.)
GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO
Barrencalle Barrena, 7 - 1.°

ESPERANTO SUR STRATO

Dum la dimanĉoj de Septembro kaj tiu unua de Oktobro vi povos vidi "sur strate" de nia urbo montrotablon, kiun la Grupon starigis celante diskonigon kaj propagandon de nia lingvo inter niaj samurbanoj kaj samtempe sciigi pri la novaj kursoj.

Ĉiam laŭ la veteron vi trovos nin en "El Arenal" aŭ "La Plaza Nueva".

NOVAJ KURSOJ - NOVAJ KURSOJ

Ĉi tiu jaro kaj kiel kutime la Grupon organizos novan kurson de Esperanto; la dato de komenco estos: la 3an de OKTOBRO kaj daŭros nur tri monatoj, do ĝi estos enkondukan, elementan kurson. Kaj ni planas organizi alian samdaŭran komence de l'venonta jaro.

Por atingi sufiĉan kvanton da lernantoj, ĉi-jare -krome aliaj aranĝoj- ni algluos propagandajn afiŝoj, kaj por tio estos necesa vian kunlaboron. Se vi pretas, sciigu tiu al ni.

... NI DENOVE ESTAS EN BILBAO

Post la Valencia Kongreso en kiu partoprenis 8 el niaj membroj kaj la Roterdama U.K. en kiu ĉeestis 5 konstantaj kongresanoj, krome la Zagreba Junulara Kongreso en kiu ankaŭ partoprenis Bilbao-anoj, kaj la Somera Tendaro okazinta en Bulgario en kiu ankaŭ ni ĉeestis, ni denove estas en Bilbao, sanaj kaj kontentaj, kaj pretaj por paroli kaj rakonti al vi pri niaj vojaĝoj, pri niaj spertoj kaj pri io kio vi povas demandi tiu rilate

Ĉu por vi estas bona la dato?: VENDREDO 30an de SEPTEMBRO. Ni atendas vin tiu tago.

NACIA LOTERIO

Post la unuaj tagoj de Oktobro vi jam povos, kiel ĉiu jaro, aĉeti aŭ apartigi Nacia Loterio ĉe la Grupo.

VIDBENDO EN ESPERANTO PRI

Finfine, post multaj demarŝoj kaj streĉoj ĉe la autoritatuloj de nia aŭtonoma Komunumo, ni sukcesis atingi la esperantan tradukon de la vidbendo "Vivir en Euskadi" (Vivi en Euskadio) eldonita de la Vaska Registaro, kiu krom la naturaj kantoj al la beleco kaj plezuro de Euskadi konsistas el invitilo por viziti kaj loĝi ĉe ni.



Tamen ni devis atingi specialan helpon de la prezidanto de H.E.F. Salvador Aragay, ĉar la traduko nepre oni devus fari en Barcelono, tial ke la originalo oni eldonis tie, kaj kiu metis je la dispono de nia amiko Julio J. Juanes, kiu tute sindoneme akceptis nian sugeston kaj translokiĝis al Barcelono, ĉion necesan por atingi la sukceson. Ankaŭ ni devas danki la partoprenon de niaj geamikoj el Barcelono, kiuj kunlaboris per pruntedono de iliaj voĉoj.


Sed ĉi tiuj laboroj oni devis fari "kontraŭhorloĝe" ĉar ni deziris havi la esperantan tradukon por prezenti ĉe la 48ª Hispana Kongreso en Valencio, tial ke ne nur estis bona okazo por prezentado de sufiĉe, laŭ ni, bona atingo, sed ankaŭ ni deziris profiti la invitan mesaĝon kiu ĝi enhavas.

EUSKADI (VASKA LANDO)

Feliĉe ni povis tion fari kaj nur restas al ni atendi la laŭdojn aŭ kritikojn kiujn la bendo meritas.



Kaj ne nur estis Valencio kiu ricevis la bendon, sed ankaŭ Rotterdam, Zagreb kaj Sofia, konas ĝin, kaj eble ni atingis ankaŭ starigi simplan produktadon de esperantajn bendojn kiuj povus taŭgi por aŭskulti esperantan elparoladon de diversaj landoj kaj altiri pli da entuziasmo pri vojaĝoj kaj internaciaj renkontiĝoj.



Libera Tribuno

PRI LA 48ª H.K. EN VALENCIO.- Jen skize kelkaj personaj impresoj pri la ĉi-jara H.K.:

★ Unue, estis bedaŭrinda la eta nombro de bilbaoanoj kiuj ĉeestis la kongreson. Malgraŭ ke la aliĝintoj estis 13, fine nur 8 vojaĝis kaj, preskaŭ ĉiuj, la kutimaj gemaljunuloj.

★ Ci-lasta estis ĝenerala problemo de la Kongreso: Cie kaj ĉie kadukaj gemaljunuloj. Cu ne estas gejunuloj en la hispana E-movado? Cu HEJS ne havas sufiĉe da fortoj por altiri siajn membrojn?. Pli trafa kaj tikla demando: Cu HEJS vere ekzistas?. Cu Gi ne estas nur fantoma organizaĵo samkiel multaj aliaj Esperantistaj, kiuj nur malfortikigas la movadon pere de enĉeligo de la jam sufiĉe mal_ multenombra Esperantistaro en disemaj organizaĵetoj kiuj nur vivas en bultenetoj sed ne en la ĉiutaga vivo?.

★ La Bilbao-a Grupo rimarkigis sian ĉeeston jene:

- En la sama ĉambro kie oni okazigis la ekspozicion de "Libro-Servo", ĉe angulo, ni starigis tablon; sur ĝi kuŝis aliĝiloj por la venonta Kongreso okazonta en nia urbo, kaj, ĉirkaŭe, ni ornamis vitrojn kaj murojn per afiŝoj montrantaj diversajn aspektojn de la Bizkaja kaj vaska vivoj: pejzaĝoj, sporto, gastronomio,... Ciu afiŝo surmontris paperstrion kun la teksto: "49ª HK DE ESPERANTO. BILBAO, 17/22 JULIO 1989".

★ La Sabaton 16-an estis projekciita, unuafoje publike, la ĵus Esperantigitan vidbendon "Vivi en Eŭskadi", pri kiu vi trovos raporton en alia paĝo.

★ Aliaj programeroj estis la kutimaj en tiuj-ĉi eventoj. Ni elstarigu du: "Artaj kaj Scienciaj horoj" plentrafe gvidataj de Sro. Alonso kaj Infaneta kurso prezentita de Sro. Añó. Kiam helpo de HEF al unuopuloj kiuj elspezas sian tempon kaj monon kaj nenion ricevas krom ripročojn aŭ kompatindajn rigardojn? Cu eldonado de "Boletín" estas la sola celo kaj vivkialo de HEF?.

★ La organizo de la Kongreso denove evidentiĝis iom improvizema. Krom malakurateca ekigo de kelkaj programeroj kaj disiĝo de la kunvenejoj, kio konfuzigis la kongresanojn, ni bedaŭris novan malĉeeston de Sro. Humphrey Tonkin (Ĉiam anoncita kaj neniam aperinta homo); same rilate la Bulgaran Esperanto-Teatron.


★ Se temas pri la ĝestado de la kongresanoj, ni devas kore gratuli kaj danki la organizantojn; manĝejoj kaj loĝejoj malmultekostaj, sufiĉe konfortaj kaj tre proksimaj de la Kongresejo.

★ Por fini, indas ankaŭ mencii la sindonemon kaj paciencon de la LKK, kies prezidanto, Sro. Casquero duafoje kaj sinsekve kuraĝis organizi HK malgraŭ malfacilaĵoj ĉies konataj, kiujn nur venkas silenta kaj konstanta laboro, multfoje nenies dankita.

Dankon kaj ĝis venonta renkontiĝo en Bilbao venontjare, kie ni iluzie atendas la tutan hispanan esperantistaron.

J.M.G.

★★



Persone 62-minutoj

Jen la nova kasedo de la rokgrupo PERSONE-62 minutoj da esperantaj originalaĵoj.

- Instrumente varie ludita (elektra gitaro, basgitaro, saksofono, drumo).
- Studie registrita (Stokholmo-1987).
- Rekomendinda por tiuj kiuj ŝatas rokmuzikon k esperantistoj ĝenerale.

KASEDO + TEKSTOKAJERO nur 1.275 p-toj.

Petu ĝin ĉe la Grupo.

★★

KRUCVORTENIGMO

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	M	A	R	J	O	R	I	E	↓
2	A	M	A	R	A	■	O	J	↓
3	R	A	P	I	Ĵ	■	N	O	B
4	O	T	■	P	O	Ŝ	■	J	O
5	K	O	T	■	■	R	E	■	U
6	A	R	U	T	R	A	■	T	L
7	N	O	T	S	E	Ŭ	■	E	T
8	I	J	O	B	■	B	E	N	O
9	N	■	N	■	K	O	K	■	N

HORIZONTALE:

① Fama brita E-verkistino (Antaŭnomo). ② Maldolĉa; Interjekcio. ③ Ret., ar´ da vestaj fermigiloj; Ret., dec´. ④ Finaĵo de estonta pasiva participo. Vestsaket´. Ret., interjekcio. ⑤ Miksaĵ de akvo kaj tero. Denov´. Finaĵo de imperativo. ⑥ Ret. kaj adjektive, vira antaŭnomo. Ret. kaj sen vokaloj, hazarda ludo. ⑦ Ret., Okcidenton. Malgrand´. ⑧ Ret., bleki kiel hundo. Ago de pastroj dum meso. ⑨ Trifoje, finaĵo de akuzativo, kaj kortbird´.

VERTIKALE.

① Virin´ de nordafrika lando. ② Neprofesiuloj. ③ Ret., duop´. Cion. ④ Ret. kaj sen "o", fruktoj. Ret. kaj sen vokaloj, animalo. ⑤ Dezerta ĝardeno. Denov´. Litero post ĵ. ⑥ Litero post p. Sulknajlo. ⑦ Kelkaĵon. Adverba finaĵo. Komenc´. ⑧ Lokoj. Ret., pur´. ⑨ Fama brita E-verkistino (familnomo).



Ĉi tiu albumo kolore ilustrita pri la aventuroj de Tinĉjo (Tintin) ni lotos inter ĉiuj la ricevitaj solvoj al la supra krucvortenigmo.